

## Groupe Espérantiste Périgourdin (GEP)

Cours d'espéranto, conférences, expositions...

17 lotissement de l'aérodrome 24330 BASSILLAC Tél. : 05 53 54 49 71  
<http://esperanto-gep.asso.fr> esperantoperigord(at)yahoo.fr

Présidents d'honneur : Jacques GREGOIRE et Jacques RAVARY.

Président : Ange MATEO, 24330 Bassillac

06 88 74 94 78 angemateo(at)yahoo.fr

Vice-président : Maurice JUY, Les Campagnolles, 24370 Calviac en Périgord.  
05 53 59 60 27 monique.juy(at)wanadoo.fr

Vice-président : Claude LABETAA, 17, lotissement de l'aérodrome, 24330 Bassillac.  
05 53 54 49 71 labetaa.claude(at)wanadoo.fr

Secrétaire : Martine DEMOUY, 114 bis, rue des Remparts, 24000 Périgueux.  
05 53 09 69 82 martine.demouy(at)wanadoo.fr

Secrétaire adjointe : Michèle DELPEY, 31, rue Antoine Gadaud, 24000 Périgueux.  
05 53 09 30 88 lmdelpey(at)gmail.com

Trésorier : Max DEMOUY, 114 bis, rue des Remparts, 24000 Périgueux.  
05 53 09 69 82 max.demouy(at)wanadoo.fr

Trésorière adjointe : Anne-Marie GALESNE, 96, rue Gambetta, 24000 Périgueux  
05 53 53 94 13 anne-marie.galesne(at)orange.fr

Déléguée auprès des jeunes : Alexia AUGRAS, 121, boulevard du Petit Change, 24000 Périgueux  
06 89 15 89 24 alexia.augras(at)orange.fr

### Relais locaux (des espérantistes près de chez vous) :

Bergeracois : Luc BAHIN, Le Pouyoulou, 24140 Beauregard et Bassac.  
05 53 80 09 38 luc.bahin(at)free.fr

Mussidanais : Richard RIO, 25 rue Arzens, 24400 Mussidan.  
05 53 82 69 71 r.rio(at)laposte.net

Périgueux et agglomération : Claude LABETAA (vice-président, coordonnées ci-dessus).

Saint Cyprien : Odette JARDIN, lieu-dit Escavailles, 24220 SAINT CYPRIEN  
05 53 29 32 75 odet.jardin(at)orange.fr

Sarladais : Maurice JUY (vice-président, coordonnées ci-dessus).

### Informilo / Bulletin d'information

Rédaction collégiale. Mise en page Claude Labetaa. Envoyez vos documents, si possible en format numérique à [labetaa.claude\(at\)wanadoo.fr](mailto:labetaa.claude(at)wanadoo.fr), avant le :

1<sup>er</sup> février pour le n° du printemps 1<sup>er</sup> mai pour le n° de l'été

1<sup>er</sup> août pour le n° de l'automne 1<sup>er</sup> novembre pour le n° de l'hiver.

### Cotisations 2015 (de sept 2014 à août 2015)

Sauf erreur de notre part, vous êtes dans la situation suivante :  service gratuit  
 adh 2015  sout 2015  adh 2016  sout 2016  veuillez régler : .....

Attention ! Nous proposons maintenant une adhésion commune Espéranto-France -

Groupe Espérantiste Périgourdin ouvrant droit à déduction fiscale. Bulletin et précisions sur demande aux adresses ci-dessus ou auprès de nos animateurs.



# ESPERANTO

## Périgord

INFORMILO n-ro 101

Aŭtuno 2015

Le bulletin d'information du Groupe Espérantiste Périgourdin,  
trimestriel en français et en espéranto.



Malgré les horreurs de l'actualité, n'oublions pas que les espérantistes œuvrent pour un monde plus humain et pratiquent le "vivre ensemble" dans la fraternité, comme l'été dernier lors du congrès universel de Lille.

- La angulo de la poeto: Masao Miyamoto ..... page 3
- La reĝo de la delto ..... page 6
- La onklo kaj la lupo ..... page 8
- Aŭtuno ..... page 9

kaj tiel plu...

## INFORMOJ

### Solidarité avec les victimes des attentats

Les espérantistes ont fait la fête l'été dernier à Lille, lors du centième congrès universel. Ce numéro d'Espéranto-Périgord devait être marqué avant tout par notre joie d'y avoir participé.

Mais l'horreur s'est imposée à nous tous, ce 13 novembre. Nous exprimons notre solidarité envers toutes les victimes des attentats ainsi que leurs proches. Ont été frappées des personnes, dont beaucoup de jeunes, qui partageaient un moment de convivialité au spectacle ou à la terrasse d'un café, qui pratiquaient le "vivre ensemble" dans la fraternité, valeur que ces criminels combattent avec une violence qui nous sidère et nous révolte.

En tant qu'espérantistes, continuons, chacun à notre niveau et malgré ce contexte où la haine nourrit la haine, à œuvrer pour un monde plus humain et fraternel. C'est pourquoi nous avons maintenu notre première page telle qu'elle était prévue : par l'expression de cette fraternité vécue et ressentie cette année à Lille, du 25 juillet au 1<sup>er</sup> août, par 2600 participants venus de 80 pays. Treize membres de notre groupe sont revenus du centième congrès universel heureux et fiers d'avoir participé à cet événement.

La photo de la première page est prise sur la place du théâtre de Lille, lors du concert organisé par nos amis "La Kompanoj".

### Guy Béart et l'espéranto : l'eau vive s'en est allée

« ... l'espéranto c'est la langue de la fraternité, en opposition à l'anglais qui s'instaure comme la langue du pognon. » Voilà ce que déclarait Guy Béart, quelques mois après avoir chanté quatre de ses chansons en espéranto lors du congrès universel de Montpellier (1998).

L'auteur-compositeur de « L'eau vive » avait pratiqué l'espéranto tout jeune, grâce à son père, adepte convaincu.

### Morice Benin s'est produit en Dordogne puis à Lille

Autre chanteur soutenant l'espéranto, Morice Benin avait même enregistré un disque dans la langue internationale pour l'interpréter lui aussi en 1998 au congrès de Montpellier. Il s'est produit en juin en Dordogne dans des cafés associatifs ("Lézidéfuz", de Léguillac de Cercles, et "la Marjolaine", de Plazac) puis chez un particulier (à Périgueux) avant de participer un mois plus tard au congrès universel de Lille.



## BALDAŬ... BIENTÔT...

### Zamenhofa tago (jour de Zamenhof), le mardi 15 décembre

Louis Lazare Zamenhof est né le 15 décembre 1859. Le 15 décembre est devenu un jour de fête pour les espérantistes du monde entier.

En Dordogne, nous préparons une série de communications par Skype avec des "samideanoj" qui se succèderont toute la journée : selon la course du soleil, la matinée sera consacrée aux pays de l'est, en commençant par le Japon, tandis que nous finirons dans la soirée vraisemblablement par nos amis mexicains.

Les périgourdiens seront réunis au magasin "Communic'action", 6 rue Gambetta à Périgueux, qui nous réservera un ordinateur de 9 h à 12 h 30 puis de 14 h à 18 h 30. Les membres du GEP, les journalistes et les simples curieux sont invités à venir constater que l'espéranto est bien une langue qui fonctionne et crée des liens amicaux sur l'ensemble de la planète.

### Le prochain congrès universel aura lieu à Nitra (Slovaquie)

Très précisément du 23 au 30 juillet 2016. Ne pas oublier de s'inscrire avant le 31 décembre pour bénéficier du tarif le plus avantageux.

Renseignements : <http://www.nitra2016.sk>

### La galette des rois du Groupe Espérantiste Périgourdin

Elle aura lieu vendredi 15 janvier, de 15 h à 19 h, dans la salle de conférences du foyer socioculturel de Trélissac. Tous les membres et amis de notre association y sont cordialement invités.

### Kvinpetalo (4 rue du Bureau, 86410 Bouresse)

Plusieurs niveaux de cours d'espéranto animés par Ansofi Markov, du 23 au 27 février. Examens FEI le 30. Renseignements : <http://kvinpetalo.org>

### Le château de Grésillon (St.Martin d'Arcé, 49150 Baugé)

Du 8 au 16 avril : PRINTEMPS, cours intensifs avec Radojica Petrović, Christophe Chazarein, Marion Quenut : <http://www.gresillon.org>

Nous sommes fiers de la devise de la France, mais nous nous sentons également des citoyens du monde :




liberté, égalité, fraternité  
libereco, egaleco, frateco



## NIA KONTRIBUO AL LA "COP21"

Les affiches ci-dessous sont disponibles, et libres de droit, en version originale française sur le site "<http://chiffres-carbone.fr>". Nous en remercions les responsables, qui nous ont confirmé l'autorisation de les traduire en espéranto. Cette version est maintenant disponible sur notre site internet (adresse en dernière page).

### Elekti sian veturilon



« La vera **solv**o estas tutia:  
necas kalkuli pri investaĵoj,  
akceli koncerne  
la **energiaj** sparoj  
kaj **malaltigi** la konsumadon. »

Christophe de Margerie (\*), PDG de Total  
pri la petroloj rezervojo.

(\*) forpasita en 2014



### Elekti sian viandon



esperantigita de / traduit en espéranto par  
le Groupe Espérantiste Périgourdin

chiffres-carbone.fr

La produkto de 1 kilogramo  
da **BOVAĜO**  
bezonas la konsumon de  
pli ol **15 000** litroj  
da **AKVO**

esperantigita de / traduit en espéranto par  
le Groupe Espérantiste Périgourdin



**Solidarecaj vortoj el la tuta Esperantujo post la atencoj de Parizo**  
**Des mots de solidarité de toute l'Espérantie après les attentats de Paris**

Voici quelques-unes des réactions de nos amis espérantistes du monde entier, lues sur internet ou reçues par les membres de notre groupe :

Mia kondolenco en la funebro de la franca popolo pro la teruraj ekatakoj en Parizo. Kia ŝoko! Dum la novajoj en nia radio kaj televido oni nur havis tiun-ĉi unu temon. Oni ŝanĝis la radian programon: klasika muziko, kaj nia arkiepiskopo parolis pri timo kaj espero.

Nia prezidento sendis la kondolecon de la tuta finna popolo al via prezidento. Ĉion bonan al vi kaj ĉiuj en Francio. Amike,

Leena, Finnlando

Miajn kondolencojn al ĉiuj gefrancoj en tiu ĉi listo pro la terura malgaja situacio, kiun travivas la tuta Francujo ekde hieraŭ. Kuraĝon al ĉiuj!

Adjévi ADJE, Lomé, Togo

Karaj geamikoj en Francio,

Bonvolu akcepti miajn kondolencojn pro la terura malgaja situacio kiu okazis en Parizo. Mi deziras grandan kuraĝon al vi ĉiuj.

Mramba Simba, Tanzanio

... Ah kara, mi estas pensante pri vi kaj ĉiuj niaj Francaj amikoj. Estas terura novaĵo, kio okazis hieraŭ... Mi ne povas kredi...

Joaquín, Meksiko

Un des plus beaux gestes est celui de Raita, la correspondante finlandaise de Jacques : elle a traduit en espéranto le texte poignant d'Antoine Leiris, qui a perdu son épouse au Bataclan et a intitulé son message, admirable d'humanité et de dignité : "Vous n'aurez pas ma haine".

Raita a fait cette traduction à la demande d'un ami japonais, qui a lui-même trouvé le texte sur le net. L'espéranto aura donc contribué à diffuser dans le monde entier ce magnifique message.

Nous vous le proposerons intégralement dans le prochain numéro.



## LA ANGULO DE LA POETO

far Ange Mateo



Masao MIYAMOTO (1913-1989) estis grava kaj konata japana esperantisto kaj poeto. Aktiva maldekstra idealisto, li eklernis esperanton en malliberejo. Verkisto, tradukisto, li faris kompladon de Vortaro Japana-Esperanta.

Legu la artikolon de Baldur Ragnarsson pri Miyamoto, "Idealisto kun meditema klarvido" en libera folio :  
<http://www.liberafolio.org/2005/aperis/baldurmiyamotom/>

**La Rememoro jam fora, Mozaiko el utaoj kaj hajkoj.**

Belartaj Konkursoj 1963, unua Premio. Aperis en Monda Kulturo, aŭtuno, 1963.

Sur sablo stranda  
suspiris ŝi sopire  
sub sun sudlanda.  
Sur blanka duno  
sub la printempa suno  
min logis reve  
Lob-nor kaj Loülan Ŝvebe.  
Ho, romantik' de l' junio!

Ĉu brulas vundo  
sur via kor' ankoraŭ?  
Printempas nun do.

Mi inon murdas!  
košmar' rompiĝis. Ŝajnas,  
narcis' nur surdas.

Ponard' oscilas  
sur ŝia brust' enprike.  
-- Printemp' deliras.  
Post pluv' printempa  
per plena pur' profilas  
pagod' pratempa.

Vespero tremas  
ĉe ino malskrupula,  
kaj roz' ĝermemas.  
Ĉu tia estas  
ĉe l' fino la virino?

aŭtuno 2015 – paĝo 4

min roz' sugestas.

Herbar' sin rulas  
ĉe mia splen' julia --,  
pilon' aĝuras.

Ĉu l' am', ekzemple,  
similas al dianto  
floranta temple?

Malvola veo  
el marĉa amo! altas  
Kasiopeo.

La firmamento  
lazuras sur la plaĝo,  
zefiro mildas  
al mia splen' senfina.

Aŭtunas hejmivilago.

Alrampas ondoj,  
forrampas, blankas ŝaŭme,  
ĉiel' aŭtuna  
sur dun' langvore plumbas.  
Ĉu ŝi min amas aŭ ne?

Ĉe sombra bosko  
pri am' eterne juna  
mi juris kun ŝi.  
De tiam kiom pasis?  
Ho, mia rev' aŭtuna!

Mi grimpe venis  
apenaŭ senanhela  
al lok' konata,  
sed la aŭtun' jam fridas  
sur la ruin' kastela.  
Ĉe l' fin' aŭtuna  
glacia pluv' plu daŭras  
sub plumb' ĉiela.  
Ĉu plenda besto splene  
eterne en mi kaŭras?

Mi iru foren,  
al insulet' sovaĝa  
por ke mi mortu  
sur fremda neĝa tero!  
Foršaŭmis rev' junaga.

Neĝfloko falis  
al mia febra vango  
per frid' pli splena.  
La rememoro foras,  
ne bolas jam la sango.

Langvoro cindra  
en kor' krizaĝa kreskas  
sub nubo vintra.

Matene la vetero estas humida. La nebulo ĉirkaŭas la arbojn de la ĝardeno, tiel same la domon. La nesovaĝa sciuro serĉas la lastajn juglandojn. Iom poste brilas la suno kaj solvas la skarpojn de nebuleto. La tuta naturo vigligas.

La ruĝaj, flavaj kaj oraj koloroj flamigas la ĝardenon. Estas belega tago, tute ne severa kaj plena je birdkantoj, je humaj aromoj miksitaj de la odoro de iu malproksima bruligata branĉaro.

Pli poste, vesperiĝas. Venteto blovas, folioj kirliĝas.

Baldaŭ la nokto ĉesigos ĉion.  
Ĝis morgaŭ matene!

## Zeoj en Pollando



Merci à notre ami Jean-Michel Chastanet, qui nous a transmis ces photos. Lors d'un voyage en Pologne, il a remarqué le nom du "Vélib" local : "Veturilo", qui signifie "véhicule" en espéranto (photo de gauche ci-contre).

Il a par la suite retrouvé d'autres "Zeoj" (Zamenhofaj Objektoj) polonais sur internet : à droite, le tombeau de Zamenhof à Varsovie et, ci-dessous, deux noms de rues.



Le matin le temps est humide. Le brouillard entoure les arbres du jardin, tout comme la maison. L'écureuil familier cherche les dernières noix. Peu après brille le soleil et dissous les écharpes de brume. Toute la nature s'anime.

Les couleurs rouges, jaunes et ors enflamment le jardin. C'est une très belle journée, pas du tout rigoureuse et pleine de chants d'oiseaux, d'arômes d'humus mélangés à l'odeur de quelque lointain feu de branchage.

Plus tard, le soir tombe. Une brise souffle, des feuilles tourbillonnent.

Bientôt la nuit fera tout cesser.

A demain matin !

## LA ONKLO KAJ LA LUPO - L'ONCLE ET LE LOUP

far Liliane Dubois (grupo de Sarlat)

Lastan semajnon la regiona radioelsendo, Radio Périgord, anoncis maltrankviligan novaĵon: iu lupo estis pafita en kokejo. Tio okazis en Perigordo!

Tiu informo memorigis al mi malnovan sed veran historion. Temas pri iu el miaj praonkloj, kiu vizitis kuzojn. Estis en aŭtuno. Ĉiuj bone manĝis, trinkis kaj gustumis la novan vinon. La tempo pasis agrable sed mia praonklo devis reiri hejmen.

En tiu epoko - antaŭ 1900 - estis nek aŭtomobiloj nek larĝaj vojoj; oni piediris sur padoj, kiu vizitis kuzojn kaj arbarojn. La onklo rapide marĝis, ĉar estis longa vojiro ĝis lia domo. Noktiĝis kaj li estis pli kaj pli laca - ĉu estis la efiko de la trinkaĵoj, kiuj ne plu provizis siajn energiojn, sed nun sentigis dormemon? Li sidiĝis sub alta arbo, apogis sin kontraŭ la trunko kaj ekkormis.

Stranga bruo vekis lin. En la duonmallumo li ekvidis lupon, kiu skrapis foliojn por superŝuti lin; ĝi eĉ pisis sur la amason da folioj! Tuj poste la besto sidiĝis iomete pli malproksime kaj hurlis por sciigi la bonan okazon al aliaj lupoj!

La onklo ekkonsciis pri la danĝero, li starigis kaj frapis tre forte siajn lignoŝuojn. Li daŭrigis sian iradon laŭte kantante. Tamen la lupo de malproksime sekvis lin. Sendube ĝi postsoptiris pri tiu bona manĝaĵo, kiu estis eskapanta el li. Mia onklo daŭre vizitis siajn familiarojn sed por sekureco li restis por dormi en ilia garbojo.

Mi opiniis, ke nun lupoj vivas nur en zoologiaj parkoj, sed eble ili intencas ŝangī... Mi timas!

aŭtuno – paĝo 8

La semajna dernière la radio régionale, Radio Périgord, a annoncé une nouvelle inquiétante : un loup a été abattu au fusil dans un poulailler. Cela s'est passé en Périgord !

Cette information m'a remis en mémoire une histoire ancienne mais vraie. Il s'agit d'un de mes grands-oncles, qui avait rendu visite à des cousins. C'était en automne. Tous avaient bien mangé, bu et goûté le vin nouveau. Le temps passait agréablement mais mon grand-oncle devait revenir chez lui.

A cette époque - avant 1900 - il n'y avait ni automobiles ni grandes routes ; on marchait à pied sur des chemins qui traversaient champs et bois. L'oncle marchait rapidement car le parcours était long jusqu'à la maison. La nuit tombait et il était de plus en plus fatigué - est-ce l'effet des boissons qui ne fournissaient plus leurs énergies mais donnaient maintenant envie de dormir ? Il s'assit sous un grand arbre, s'adossa au tronc et s'endormit.

Un bruit étrange le réveilla. Dans la demi-obscurité il vit un loup qui grattait des feuilles pour le recouvrir ; il urina même sur le tas de feuilles ! Tout de suite après la bête s'assit un peu plus loin et hurla pour faire savoir la bonne occasion aux autres loups !

L'oncle prit conscience du danger, il se mit debout et frappa très fortement ses sabots. Il continua son chemin tout en chantant fort. Cependant de loin le loup le suivait. Sans doute il soupirait après ce bon repas, qui était en train de lui échapper. Mon oncle continua à rendre visite aux membres de sa famille mais par sécurité il restait dormir dans leur grange.

Je pensais que maintenant les loups ne vivaient que dans les parcs zoologiques, mais peut-être ont-ils l'intention de changer... J'ai peur !

## SOUVENIRS DE LILLE

par Claude Labetaa

Lors de ce congrès, je me suis concentré sur deux objectifs principaux. Le premier était une tâche à effectuer à la demande d'un scientifique, spécialiste de phonétique, souhaitant faire une étude statistique de la façon de prononcer l'espéranto : il s'agit surtout d'étudier l'influence de la langue maternelle. Cette mission m'a permis d'établir le contact avec des personnes de tous les continents puis de les enregistrer lors de phrases tests. J'ai ainsi eu le plaisir d'enregistrer 54 personnes, vivant dans 26 pays et ayant 21 langues maternelles différentes, choisies avant tout pour leur bonne maîtrise de l'espéranto... et je n'en dirai pas plus pour l'instant, car les conclusions de l'étude ne sont pas encore tirées !

Le deuxième objectif était d'organiser la communication Lille-Périgueux par Skype avec nos amis restés en Dordogne. Grâce à Alexia, qui a fait la promotion de l'opération, nous étions très bien entourés : sur les photos du bas, Dinah interview la brune Sarah, brésilienne, et la blonde Elena, russe. Une chinoise, une colombienne et un couple iranien ont également participé à la communication. En haut à gauche, Ghislaine est entourée par nos amis mexicains Joaquín et Guadalupe et, à droite, Joaquín nous présente ses enfants et un de leurs amis.



## LA REĜO DE LA DELTO

Teksto: Claude Labetaa Fotoj: André Labetaa

Ni nun finas la raporton pri nia vizito de la Danubo-delto, en Rumanio, per la reĝo de la delto: la blankvosta maraglo (*pygargue à queue blanche*).

Pelikanoj, diversaj kormoranoj kaj ardeoj estas tipaj vivuloj de la delto sed estus domaĝe pasigi unu semajnon en la delto sen observi unu el niaj ĉefaj celoj, la blankvostan maraglon.

Agloj estas famaj rabobestoj, kies enverguro estas impresiva. Ekzemple tiu de la reĝa aglo de niaj Pireneoj aŭ Alpoj mezuras de 2 m ĝis 2,20 m. Sed reĝa aglo estas ĉefe montara birdo, kiu nestas precipite sur klifoj kaj kaptas montarajn predojn, kiel marmotojn...

Maraglo estas tiel granda kiel reĝa aglo sed vivas borde de maroj aŭ grandaj lagoj. Ĝi kaptas fiŝojn, akvobirdojn... Kaj nek mia frato nek mi jam observis maraglon antaŭ nia restado en la delto. Tiu specio ne nestas en Francio kaj nur unu aŭ du ekzempleroj kutime montriĝas vintra en kelkaj tre maloftaj lokoj de nia lando, kiel Ĉampanjaj lagoj (« lac du Der »).

La unuaj tagoj ni ekvidis iujn, tre malproksimajn en la ĉielo kaj nur dum kelkaj sekundoj. Ĉiufoje danke al la forta vidkapablo de niaj amikoj Jean-Pierre kaj Philippe, fakuloj pri birdoj. Unufoje mi observis iun specimenon per mia binoklo fulmrapide malsuprenirantan al iu predo sed mi ne vidis la finon de la flugo pro la arbetoj ĉirkauantaj min.

Sed ni planis rezervi apartan tagon por serĉi la maraglon en la Caraorman arbaro, kie ĝi nestas laŭ informoj trovitaj en la reto. Post iom longa kaj atentega piedirado ni ekvidis iun tipan silueton sur branĉo de mortinta arbo, verŝajne je pli ol 500 metroj for de ni. Unue ni instalis la lornon ĉar binoklo ne suficiĝas je tiu distanco. La unuan fojon ni observis ĝin dum longaj minutoj... Vidu la unuan foton, kiu montras la arbaron en kiu ĝi nestas. La impona maraglo aperas nur kiel punkto pro la distanco. Ni tamen povas imagi, ke ĝi trovis gvatejon super sia reĝlando.

Post tiu kuraĝiga komenco ni decidis provi observadon pli proksiman. Arbareteto povis kaŝi nin dum zorga alproksimiĝo... Sed preteririnte tiun arbareteton la birdego ne plu ĉeestis! Ĉu malfortuno? Ĉu ĝi divinis nian intencon? Kiel sci? Ni konsolis nin per observado de pli komunaj specioj.

Venis la lastaj tagoj de nia restado kaj la longa reveno per nia ŝipeto al Tulcea, la enirurbo de la delto (kaj tiam por ni elirurbo!). Post nia tagmanĝo, duonsiestante en la trankvilo de la posttagmezo mi aŭdis mallaŭtan sed firmegan alvokon: « Claude! Rigardul! Jen estas maraglo! ».

Borde de la Danubo-brako, kiun laŭiris la ŝipeto, maraglo staris sur alta branĉo de arbo, ŝajne trankvila kiel buteo rande de unu el niaj aŭtovojoj!

Dum la ŝipeto plu antaŭeniris — la piloto oportune elektis nenion ŝanĝi por ne alerti la birdon — André fotis ĝin uzante sian motorigitan fotilon ĝis kaj tuj post ĝia ekflugo.

Ni ne kredis niajn okulojn: anstataŭ fuĝi alidirekte, la belega rabobirdo pasis je malpli ol dudek metroj de ni, kvazaŭ por danki nin pro nia vizito!

La dua foto montras la maraglon fiere starantan sur sia branĉo kaj la tria montras ĝin unu aŭ du sekundojn post la ekflugo. Oni bone vidas ĝian fortegan bekon kaj la rimarkindan blankecon de ĝia vosto, kiu estas tipa ĉe la plenkreskuloj de tiu specio. Kompreneble ĉi tiuasta estas pri tekniko kaj pri emocio unu el la plej belaj fotoj de mia frato.

